


# La mistero de Sankta Cornely

« Sankta Cornely estis papo en Romo. Paganaj soldatoj deziris lin kapti, sed li sukcesis sin forsavi kun du bovoj, kiuj portis liajn aferojn. Iun vesperon li alvenis ĉe la tumulo Sankta Mikaelo kaj konstatis, ke li ne plu povas esperi : antaŭ li kuŝis la maro, kaj post li venis la paganaj soldatoj. Tiam venis al li la ideo sin kaŝi en la orelon de unu el la bovoj. Kaj tuj la soldatoj ŝtoniĝis. Poste Sankta Cornely faris multajn miraklojn : aveno maturiĝis tuj post semado, kaj li protektis la bovojn. Kiam li mortis oni lin enterigis en la monteto Sankta Mikaelo, kie oni konstruis kapelon. De tiu tempo oni ĉiujare solenas la « Pardon » de Sankta Cornely.

Tiun rakonton vi aŭdas de unu el la infanoj, kiuj atendas la turistojn ĉe la linioj de menhiroj de Menec en Carnac (Bretonio). Ĉu tiu rakonto temas pri la vivo de iu Cornely ? Oni povas dubi pri tio ĉar ŝajnas, ke la papo Cornelius (251-253) neniel rilatas al Sankta Cornely. Sed restas la fakto, ke Cornely estas sankta estulo, kies kulto rilatas al la bonstato de la bovoj kaj al la sezona ciklo de greno.

Tiu lasta punkto devigas nin aludi pri la orientiĝo de la menhir-linioj. Oni fakte konstatis, ke la linioj de Kermario orientiĝas al la loko, kie la suno leviĝas je la somera solstico (azimuto 54° la 21an de junio). La menhiroj de Kerlescan preskaŭ perfekte sekvas la ekvinoksan linion. La mezaj someraj sunleviĝoj (8an de majo kaj 8an de aŭgusto) estas montritaj de la menhir-linioj de Menec, kaj la vintraj mezaj sunleviĝoj (8an de novembro kaj 4an de januaro) de la menhir-linioj de Sainte Barbe kaj Saint-Pierre-Quiberon. Ĉiu el tiuj orientiĝoj korespondas al natura fenomeno : la ekvinoksoj al la plej altaj tajdoj, la somera solstico al la plej mallonga nokto kaj la vintra solstico al la plej longa. La mezaj sunleviĝoj korespondas al semado, ĝermado, florado kaj rikolto. Pro tio specialisto de bretonia prahistorio diris, ke la menhir-linioj estis religiaj monumentoj, kien kunvenis la homoj okaze de religiaj ceremonioj je la dato montrita de la orientiĝo de la ŝtonoj.

Ni revenu al Sankta Cornely. Oni lin gloras je la aŭtuna ekvinokso. Ĉu tiu legenda sanktulo fakte estus dio de la megalita mitologio ? La kapeloj al li dediĉitaj staras apud la menhirlinioj de Carnac, Ladeven, Plouhinec kaj Languidic. Ĉar kristianismo ĝenerale adoptis, iom transformitajn, la antaŭajn mitojn, oni povas pensi, ke ekzistas ligilo inter Sankta Cornely kaj la kulto ekzistanta, kiam tie establiĝis kristianismo. Nenio vere pruvas, ke tiam pluekzistis iu megalita kulto, sed alia konstato povas montri, ke eĉ nuntempe, en la XXa jarcento, oni ankoraŭ kredas je la megalitaj dioj. Kelkaj menhiroj tute sendube havas la formon de penisoj, kaj la tradicio instigas la senidajn virinojn froti sian ventron kontraŭ tiuj ŝtonoj kiam ili deziras infanon.

Ĉu fakte Sankta Cornely ekzistis? La legendo rakontas ke oni enterigis lin en la tumulo Sankta Mikaelo. Kiam, antaŭ cent jaroj oni fosis tiun monumenton, vertikala galerio kondukis al dolmeno (do, tombo). Aliaj galerioj ebligis atingi centran ĉambron, kie oni trovis dudekon da ŝtonkofroj. Krom la kutimaj postrestaĵoj oni trovis ostaĵojn de viro kaj de pluraj bovoj. Poste, kiam oni traktis ĝin per karbono 14 oni konstatis, ke kelkaj el la postrestaĵoj estas 5000 jaraj kaj kelkaj aliaj 9000 jaraj. Ĉu oni povas konkludi, ke Sankta Cornely estis fakte prahistoria homo respektegata de siaj samtempuloj ?

Kia ajn estas la opinio de la dudek-jarcenta homo pri sankta Cornely kaj pri la signifo de la menhiroj, restas demando senresponda. Kiamaniere la tiamaj homoj starigis tiujn ŝtonegojn ? Kelkaj estas pli ol tricent mil kilogramojn pezaj. Tiu de Locmariaquer, kiu kuŝas frakasita en tri partojn estas 21 metrojn alta. Kiamaniere oni